

Joseph Mohr,  
Paca nokt'

*tradukita de Joachim Gießner*

Paca nokt', sankta hor',  
malkviet' foras for.  
Nur maldormas la sankta par',  
knabo eta kun bukla harar'  
dormu en ĉiela trankvil',  
dormu en ĉiela trankvil'!

Paca nokt', sankta hor',  
paŝtistar' en ador'.  
Tra l'angela haleluja  
al la mond' sonegas ja:  
venis Krist', la Savant',  
venis Krist', la Savant'.

Paca nokt', sankta hor',  
dia fil', via kor'  
donas amon dian sen fin',  
de malbon' vi savis ja nin,  
Krist', per via naskiĝ',  
Krist', per via naskiĝ'.

*Traduko de la Germana poemo "Weihnachtslied" de JOSEPH MOHR (\*1792 – †1848) en Esperanton de JOACHIM GIESSNER (\*1913-12-23 – †2003-11-25).*

*Arg-136-271 (2004-01-25 15:29:33)*

*La tradukinto, Joachim Giessner, estis ĝis 2002 la estro de Germana Fervojista Esperanto-Asocio. Li tradukis multajn kantojn en la Internacian Lingvon. Kelkaj troviĝas en aldono al la ttt-pagharo de GEA <http://www.esperanto.de/kantoj/index-giessner.html> kaj ankaŭ en la kantlibro "Mia kantaro" de Josef Schiffer, Wilstorfstr. 58, D-78050 Villingen-Schwenningen, tel. +49-(0)7721-508891, retpoŝto: [Josef.Schiffer@esperanto.de](mailto:Josef.Schiffer@esperanto.de).*

Joseph Mohr,  
Weihnachtslied

1. Stille Nacht, heilige Nacht!  
Alles schläft, einsam wacht  
nur das traute, hochheilige Paar.  
Holder Knabe im lockigen Haar,  
schlaf in himmlischer Ruh,  
schlaf in himmlischer Ruh!

2. Stille Nacht, heilige Nacht!  
Hirten erst kundgemacht.  
Durch der Engel Halleluja  
tönt es laut von fern und nah:  
Christ, der Retter ist da,  
Christ, der Retter ist da!

3. Stille Nacht, heilige Nacht!  
Gottes Sohn, o wie lacht  
Lieb' aus deinem göttlichen Mund,  
da schlägt uns die rettende Stund',  
Christ, in deiner Geburt!  
Christ, in deiner Geburt!

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas JOSEPH MOHR (\*1792 – †1848), publikigita 1818.*

*Arg-136-269 (2004-01-25 14:58:16)*

*Diese Fassung des bekannten deutschen Weihnachtsliedes entspricht dem in deutschsprachigen evangelischen Gesangbüchern gewöhnlich abgedruckten Text der ersten, sechsten und zweiten Strophe der ursprünglich sechsstrophigen Urfassung. Siehe [http://www.stillennacht.info/de/stillennacht/d\\_noten.htm](http://www.stillennacht.info/de/stillennacht/d_noten.htm)*